

*Piotr Kropotkin*  
**La Pariza**  
**Komunumo**

---

---

KROPOTKIN, Piotr: «La Commune de Paris», *Le Révolté* (1880).  
Esperantigita de Jurgo Alkasaro el *La Brochure Mensuelle* 180(1937)14-32.

Marton de la 2010a

---

---



# La Pariza Komunumo

## *Piotr Kropotkin*

### I

La 18an de marto de la 1871a la pariza popolo ribelis kontraŭ povo malamata kaj malinda laŭ ĉiuj kaj proklamis la urbon Parizo sendependa, libera, memmastra.

Tiu ĉi renverso de la centra povo okazis eĉ sen la scenigo kutima al revolucio: ĉi-tage estis neniuj fusilpafadoj, neniuj flakoj el sango verŝita post la barikadoj. La registoj malaperis antaŭ la surstratiĝinta armita popolo: la trupo forlasis la urbon, la funkciuloj rapidis fuĝi al Versajlo kunportante ĉion, kion ili taŭgis kunporti. La registaro vaporiĝis, kiel baseno de putra akvo sub la blovo de printempa vento, kaj la 19an Parizo, sen elverŝi apenaŭ unu solan guton el la sango de siaj gefiloj, sin trovis libera el la poluado, plagante la grandan urbon.

Tamen la revolucio, kiu tiele okazis, malfermis novan eraon je la serio de revolucioj, per kiuj la popoloj iras de la sklaveco al la libereco. Sub la nomo de *Pariza Komunumo* naskiĝis nova *ideo*, alvokita fariĝi la elirpunkto de la estontaj revolucioj.

Kiel okazas ĉiam al la grandaj ideoj, ĝi ne estis frukto de la cerbumado de filozofo, de individuo: ĝi naskiĝis ĉe la kolektiva spirito, ĝi eliris el la koro de la tuta popolo; sed ĝi dekomence estis malpreciza kaj multaj homoj eĉ inter tiuj, kiuj realigis ĝin kaj donis sian vivon por ĝi, ne komprenis ĝin dekomence tiel, kiel ni komprenas ĝin hodiaŭ; ili ne komprenis la revolucion, kiun ili komencis, la

fruktodonecon de la nova principo, kiun ili klopodis realigi. Nur ĉe la praktika apliko oni komencis duonvidi ĝian estontan gravecon; nur ĉe la pensa laboro, kiu okazis poste, tiu nova principo preciziĝis pli kaj pli, determiniĝis kaj aperis per sia tuta klarmenso, sia tuta beleco, sia justeco kaj la graveco de siaj rezultoj.

Ekde kiam la socialismo prenis novan impulson dum la kvin aŭ ses jaroj antaŭantaj la Komunumon, iu demando zorgigis la pretigantojn de la proksima socia revolucio. Tiu estis la demando pri kiu estus la kiel de la politika grupigo de la socioj, kiu estas la plej favora al tiu ĉi granda ekonomia revolucio, kiun la nuna disvolvo de la industrio trudis al nia generacio, kaj kiu estas nepre la abolicio de la individua proprieto kaj la komunigo de la tuta kapitalo, amasigita de la antaŭantaj generacioj.

La Internacia Asocio de la Laboristoj donis la respondon. La grupigo, diris ĝi, ne povas limiĝi al unu sola nacio: ĝi devas etendiĝi preter la artefaritajn naciliojn. Kaj tuj kiam tiu ĉi ideo eniris la korojn de la popoloj, ĝi regis la spiritojn. Persekutita poste de la ligo de ĉiuj reakciuloj, ĝi tamen pluvivas kaj, kiam la bariloj kontraŭ ĝia disvolvo estos detruitaj de la voĉo de la ribelantaj popoloj, ĝi renaskiĝos pli fortika ol iam ajn.

Sed, mankas scii, kiuj estos la partoj, konsistigantaj tiun ĉi ampleksan Asocion.

Tiam du grandaj ideokurentoj stariĝis

por respondi tiun ĉi demandon: la *popola ŝtato* unuflanke, aliflanke la *anarkio*.

Laŭ la germanaj socialistoj la ŝtato devas alproprigi ĉiujn amasigitajn riĉaĵojn kaj disdoni ilin al la laboristaj societoj, organizi la produktadon kaj la interŝanĝon, prizorgi la vivon, la funkciadon de la socio.

Al tio la plejmulto el la latinrasaj socialistoj, sinbazante sur sia sperto, respondas, ke tia ŝtato, eĉ akceptante ĝian neblan ekziston, estus la plej malbona el la tiranioj, kaj ili kontraŭmetis al tiu ideo, imitanta la estintecon, novan ideon, la *anarkion*, t.e. la plenan abolicion de la ŝtatoj kaj la organizon el la simpla al la malsimpla pere de la libera federacio de la popolaj fortoj, de la produktantoj kaj de la konsumantoj.

Baldaŭ estis agnoskate, eĉ de iuj “ŝtatestoj”, tiuj malpli regataj de la registaremaj antaŭjuĝoj, ke certe la anarkio estas organizado multe pli supera ol tiu celata de la popola ŝtato; sed, oni diras, la anarkiista idealo estas tiom for de ni, ke ni ne bezonas zorgi pri ĝi nuntempe. Aliflanke, la anarkiista teorio estas mankata de samtempe konkreta kaj simpla formulo por precizigi sian elirpunkton, por doni korpon al siaj pensoj, por montri, ke tiuj surbazas sur tendenco, kiu reale ekzistas ĉe la popolo. La federacio de la ofickorporacioj kaj de la konsumgrupoj preter la nacilimoj kaj for de la nunaj ŝtatoj ŝajnis ankoraŭ tro malkonkreta; kaj oni facile duonvidas, ke ĝi ne taŭgas enhavi ĉiun diversecon de la homaj manifestajoj. Nepris trovi formulon pli netan, pli kompreneblan, formulon kun ties praeroj ĉe la realo de la aĵoj.

Se temus nur pri ellaborado de teorio, ni estus dirinta: Por kio gravas la teorioj! Tamen, laŭmezure ke nova ideo ne trovas sian esprimon netan, precizan kaj devenantan el ĉeestantaj aĵoj, ĝi ne regas la spiritojn, ne inspiras ilin ĝis la punkto lanĉi ilin al findecida batalo. La popolo

ne sin ĵetas al la nekonato, sen apogi sin sur certa kaj klare formulita ideo, kiu servas al ĝi kiel saltotabulo, por tiel diri, ĉe sia elirpunkto.

Tiun ĉi elirpunkton la vivo mem zorgis montri.

Dum kvin monatoj Parizo, izolita de la sieĝo, vivis sian propran vivon kaj lernis ekkoni la egajn ekonomiajn, intelektajn kaj moralajn rimedojn, kiujn ĝi enhavis; ĝi duonvidis kaj komprenis sian porinicitan kapablon. Samtempe ĝi vidis, ke la bandaĉo el friponuloj, alproprigantaj la povon, taŭgis organizi nenion, nek la defendon de Francio nek la enan disvolvon. Ĝi vidis, kiel tiu centra registaro baris ĉion, kion la inteligento de granda urbo povus naski. Ĝi komprenis ankoraŭ pli: la senpovecon de kiu ajn registaro por eviti la gravajn fiaskojn, por faciligi la evoluon preta plenumiĝi. Ĝi suferis dum la sieĝo teruran mizeron, la mizeron de la laboristoj kaj de la defendantoj de la urbo apud la impertinenta lukso de la neniofarantaj, kaj ĝi vidis fiaski, kaŭze de la centra povo, ĉiuj ties klopodoj por fini tiun ĉi skandalan reĝimon. Ĉiufoje, kiam la popolo klopodis preni liberan impulson, la registaro alvenis plipezigi la ĉenojn, religi la bulon, kaj plennature naskiĝis la ideo pri tio, ke Parizo bezonis stariĝi kiel sendependa komunumo, realigante tiel post ties muroj tion, kion ordonis al ĝi la popola penso!

Tiu ĉi vorto: LA KOMUNUMO, eliris tiam el ĉiuj buŝoj.

La 1871a Komunumo povis esti nenio pli ol unua provo. Naskita ĉe fino de milito, ĉirkaŭita de du armeoj, pretaj kunlabori por fiaskigi la popolon, ĝi ne kuragiĝis eniri plene la vojon al la ekonomia revolucio; ĝi ne agnoskis sin senkaŝe socialista, ĝi ekis nek la senproprigon de la kapitaloj nek la organizadon de la laboro, eĉ nek la ĝeneralan censadon de ĉiuj urbaj rimedoj. Ĝi ne rompis la tradicion pri la ŝtato, pri la reprezenta registaro,

kaj ĝi ne klopodis efektiviĝi ĉe la Komununo tiun ĉi organizadon el tio simpla al tio kompleksa, kiun ĝi komencigis, kiam ĝi proklamis la sendependon kaj liberan federacion de la komunumoj. Sed certas, ke, se la Pariza Komunumo estus pluvi-vinta iujn pliajn monatojn, ĝi estus neevitinde puŝita de la aferoj mem al tiuj du revolucioj. Ni ne forgesu, ke la burĝaro elspezis kvar jarojn de revolucia periodo por pasi el la modera monarkio al la burĝa respubliko, kaj ni ne estos ŝokitaj de tio, ke la pariza popolo ne pasis per unu sola salto la spacon inter la anarkiista komunumo kaj la rego de la friponuloj. Kaj ni scios ankaŭ, ke la proksima revolucio, kiu estos komunumista, ĉu en Francio kaj certe ankaŭ en Hispanio, reprenos la laboron tie, kie ĝin haltigis la murdoj de la versajlanoj.

La Komunumo pereis kaj la burĝaro venĝis, ni scias kiel, de la timo, kiun la popolo suferigis al ĝi, skuante la jugon de siaj regantoj. Ĝi pruvis, ke estas reale du klasoj ĉe la socio: unuflanke la laboranta homo, kiu donas al la burĝo pli ol la duono de sia laborprodukto kaj kiu tamen indulgas tro facilanime la krimojn de siaj mastroj; aliflanke la neniofaranto, la glutemulo, agante kun instinktoj de sovaĝa besto, malamante sian sklavon, preta dispecigi lin kiel ĉasaĵon.

Post sieĝi la parizan popolon kaj fermi ĉiujn elirojn, ili ĵetis la soldatojn, brutigitajn de la kaserno kaj la vino, dirinte al ili ĉe asembleo: “*Mortigu tiujn lupojn, tiujn lupinojn kaj tiujn lupidojn!*” *Kaj al la popolo ili diris<sup>i</sup>:*

*Kion ajn vi faros, vi pereos! Se oni prenas vin kun armiloj ĉemane, la morton! Se vi demetas la armilojn, la morton! Se vi fra-*

*pas, la morton! Se vi plorpetas, la morton! Kien ajn vi turnus la vidon: dektren, maldekstren, antaŭen, malantaŭen, supren, malsupren, la morton! Vi estas ne nur for de la leĝo, sed ankaŭ for de la homeco. Nek la aĝo, nek la sekso taŭgos savi vin, nek vin nek la viajn. Vi mortos, sed antaŭ vi spertos la agonion de via edzino, de via fratino, de via matrino, de viaj filinoj, de viaj filoj eĉ ĉe la lulilo! Oni iros, sub via vido, preni la bunditon el la ambulanco por haki lin per bajoneto, por frakasi lin per fusilkolbo. Oni tiros lin de lia rompita kruro aŭ de lia sangadanta brako kaj ĵetos lin al la rivero kiel kriegantan kaj suferantan rubaĵon.*

*La morton! La morton! La morton!*

Kaj plue, post la senbrida orgio sur la amasoj de kadavroj, post la amasa pereigo, la mizerkora kaj tamen terura venĝo, kiu daŭras ankoraŭ, la naŭvosta kato, la mankateno, la skrapilo, la vipfrapoj kaj la bastonoj de la prizongardistoj, la insultoj, la malsato —ĉiuj rafinaĵoj de la krueleco.

Ĉu la popolo forgesos tiujn ĉi noblajn verkojn?

“Renversita sed ne venkita” la Komununo renaskiĝas hodidaŭ. Tio ne estas nur revo de venkitoj, kiu karesas ĉe la imago belan esperigan miraĝon, ne! *La Komunumo* fariĝis nun la precisa kaj videbla celo de la revolucio, kiu kreskas jam ĉe ni. La ideo eniras la amasojn, ĝi donas al ili flagon kaj ni kalkulas firme pri la nuna generacio por plenumi la *socian revolucion ĉe la komunumo*, por finigi la malnoblan burĝan ekspluatadon, liberigi la popolojn de la povon de la ŝtato, komenci ĉe la evoluo de la homa specio novan eraon de libero, de egaleco, de solidareco.

## II

Dek jaroj apartigas nin el la tago, kiam la pariza popolo —post faligi la registaron el perfiduloj, kiuj alprenis la povon

post la falo de la imperio— stariĝis kiel Komunumo kaj proklamis sian plenan sendependon<sup>ii</sup>. Kaj tamen estas ankoraŭ

al tiu dato de la 18a de marto de la 1871a, kien celas niaj rigardoj, estas en ĝi, kie estas ligitaj niaj plej bonaj memoraĵoj; estas la datreveno de tiu memorinda tago, kion la proletaro el du mondoj celas solene festi kaj morgaŭ vespere centoj da miloj da laboristaj koroj batos unuvoĉe, interfratiĝante tra landlimoj kaj maroj, en Eŭropo, en Usono, en Sudameriko, per la memoro pri la ribelo de la pariza proletaro.

Ĉar la ideo, por kiu la franca proletaro elverŝis sian sangon en Parizo kaj por kiu suferis la plagojn de Nov-Kaledonio, estas iu el tiuj ideoj, kiuj je si mem enhavas plenan revolucion, ampleksa ideo, kiu povas ricevi sub la plisoj de sia flago ĉiujn revoluciajn tendencojn de la popoloj, alirantaj sian liberigon.

Certe, se ni limigas nin rigardi nur la realajn kaj tuŝeblajn atingojn de la Pariza Komunumo, ni devus aserti, ke tiu ĉi ideo estis ne sufiĉe ampleksa, ke ĝi enhavis nur minimuman parton de la revolucia programo. Sed, se kontraŭe ni rigardas la spiriton, kiu inspiris la popolajn amasojn en la movado de la 18a de marto, la tendencojn, kiuj klopodis eliri al la lumo kaj kiuj ne havis sufiĉan tempon por atingi la kampon de la realo, ĉar, antaŭ ol flori, ili estis sufokataj sub amasoj el kadavroj, tiam ni komprenos la plenan gravecon de la movado kaj la simpatiojn, kiujn ĝi inspiras ene de la laboristaj klasoj el la du mondoj. La Komunumo entuziasmigas la korojn ne pro tio, kion ĝi faris, sed pro tio, kion ĝi promesas fari iun tagon.

El kie devenas tiu ĉi nerezistebla forto, altiranta al la 1871a movado la simpatiojn de ĉiuj subpremitaj amasoj? Kiun ideon prezentas la Pariza Komunumo? Kaj kial tiu ĉi ideo estas tiom altiranta por ĉiuj proletoj el ĉiuj landoj, el ĉiuj nacioj?

La respondo facilas. La revolucio de la 1871a estis movado esence popola. Farita

de la popolo mem, naskiĝinta spontanee el la amaskerno, estas en la granda popola amaso, kie ĝi trovis siajn defendantojn, siajn heroojn, siajn martirojn kaj ĉefe tiun ĉi “kanajlan” karakteron, kiun la burĝaro neniam pardonos al ĝi. Kaj samtempe la ideo, generanta tiun ĉi revolucion, ja nepreciza, eble senpripensa, tamen taŭge esprimita per ĉiuj ties agoj, estas la ideo pri la socia revolucio, klopodanta starigi finfine post tiom da luktjarcentoj la aŭtentikan liberon kaj la aŭtentikan egalecon por ĉiuj.

Ĝi estis la revolucio de la “kanajlaro” cele al la konkero de ties rajtoj.

Oni klopodis, certe, oni klopodas ankoraŭ misprezenti tiun ĉi revolucion kiel nuran provon reakiri la parizan sendependon kaj starigi etan ŝtaton ene de Francio. Nenio el tio pravas. Parizo ne celis sin izoli el Francio, same kiel ĝi ne celis konkerti tiun per armiloj; ĝi ne klopodis fermiĝi ene de siaj muroj kiel benediktano ene de ties klostro; ĝi ne imitis sakristian mallarĝan spiriton. Se ĝi postulis sian sendependon, se ĝi deziris malebligi la altrudiĝon en siaj aferoj de ĉiu centra povo, estis ĉar ĝi rigardis tiun sendependon kiel ilon por prilabori trankvile la bazojn de la estonteca organizado kaj realigi per tiu la socian revolucion, revolucion, kiu estus plene transforminta la produktadan kaj interŝanĝan reĝimon, bazigante tiun sur la justo, kiu estus plene transforminta la interhomajn rilatojn, bazigante tiujn sur la egaleco, kaj kiu estus refarinta la moralon de nia socio, bazigante tiun sur la principoj de la justo kaj la solidaro.

La komunuma sendependeco estis do al la pariza popolo nenio pli ol perilo kaj la socia revolucio estis la celo.

Tiun ĉi celon oni estus ja atinginta, se la revolucio de la 18a de marto povintus sekvi libere sian vojon, se la pariza popolo ne estus dispecigita, sabrotranĉita, mitralita, sentripigita de la murdistoj el

Versajlo. Trovi ideon klaran, precizan, por ĉiuj kompreneblan, kaj kiu skizus malmultvorte tion, kion nepris por realigi la revolucion, tiu ĉi ja estis la zorgo de la pariza popolo ekde la unuaj tagoj de ties sendependado. Sed granda ideo ne ĝermas je unu tago, malgraŭ la rapido de la prilaboro kaj disvastiĝo de la ideoj je revoluciaj tempoj. Ĝi bezonas iun tempon por disvolviĝi, por eniri la amasojn kaj por sin esprimi per agoj, kaj tiu ĉi tempo mankis al la Pariza Komunumo.

Tiom pli mankis tio al ĝi, ĉar antaŭ dek jaroj la ideoj mem de la moderna socialismo travivis transiran periodon. La Komunumo naskiĝis, por tiel diri, inter du etapoj de la disvolvo de la moderna socialismo. Je la 1871a la aŭtoritema, registarema kaj pli-malpli religia socialismo de la 1848a jam ne allogis la praktikajn kaj liberecanan spiritojn de nia tempo. Kie trovi nun parizanon, kiu konsentus sin fermi en falanstero? Aliflanke la kolektivismo, kiu deziras ligi al la sama ĉaro la salajratan laboron kaj la kolektivan proprieton, estis nekomprenebla, malmulte alloga, plenplena el malfacilaĵoj je sia praktika starigo. Kaj la libera komunismo, la anarkiista komunismo, estis apenaŭ naskiĝanta, ĝi apenaŭ kuraĝis alfronti la atakojn de la adorantoj al la registaremo.

La nedecidemo regis la spiritojn kaj eĉ la socialistojn sentis sin nekapablaj detruigi la privatan proprieton, ĉar ili havis neniun klaran celon antaŭ ili. Tiam oni lasis sin trompi de tiu argumento, kiun la mensogistoj rediras jarcento post jarcento: «Ni sekurigu unue la venkon, poste ni vidos, kion oni povas fari».

Sekurigi unue la venkon! Kvazaŭ estus kielo stariĝi kiel libera komunumo sen tuŝi la proprieton! Kvazaŭ estus kielo venki la malamikojn, sen la rekta intereso de la granda popola amaso por la venko de la revolucio, rigardante alveni la materia, intelekta kaj morala bonfarto por ĉiuj! Oni serĉis firmigi unue la Ko-

munumon, lasante ĝis pli poste la socian revolucion, kiam la sola ŝanco estis *firmigi la Komunumon pere de la socia revolucio!*

Okazis same kun la registarema principo. Per la proklamado de la Komunumo la pariza popolo proklamis principon esence anarkiistan; tamen, ĉar je tiu tempo la anarkiista ideo eniris nur suprajne la spiritojn, ĝi haltis duonvoje kaj ene de la Komunumo emis ankoraŭ la malnovan aŭtoriteman principon, kiam ĝi provizis al si Komunuman Konsilion, kiu reproduktis la municipajn konsiliojn.

Se ni reale kredas, ke centra registaro estas absolute senutila por regi la rilatojn de la komunumoj inter ili, kial ni devus akcepti ĝian bezonon por regi la reciprokajn rilatojn de la grupoj, konsistigantaj la Komunumon? Kaj, se ni fidas je la libera iniciato de la komunumoj la taskon interkompreniĝi ĉe la entreprenoj, kiuj koncernas plurajn urbojn samtempe, kial nei tiun saman iniciaton al la grupoj, konsistigantaj komunumon? Registaro de la Komunumo havas neniun kialon pli ol registaro super la Komunumo.

Sed je la 1871a la pariza popolo, kiu faligis tiom da registarojn, estis nur je sia unua provo de ribelo kontraŭ la registara sistemo mem: ĝi sin lasis kondukti de la registarema fetiĉismo kaj donis al si registaron. La sekvoj estas konataj. Ĝi sendis siajn plej dotitajn filojn al *Hôtel-de-Ville* [pariza urbodomo]. Tie paralizitaj meze de la paperamasoj, devigitaj regi kontraŭ siaj instintoj, kiuj ordonis al ili esti kaj marŝi kun la popolo; devigitaj diskuti, kiam oni bezonis agi kaj perdis la inspiron, kiu devenas el la senĉesa kontakto kun la amasoj, ili estis senkapablataj. Paralizitaj kaŭze de sia foresto de la revolucikerno, la popolo, ili paralizis siavice la popolan iniciaton.

Naskiĝinta dum transira periodo, je kiu la ideoj pri socialismo kaj aŭtoritato

suferis ĝisfundan transformiĝon, naskiĝinta je militfino, ĉe izolita punkto, sub la prusaj kanonoj, la Pariza Komunumo nepre pereis.

Sed, kaŭze de sia esence popola karaktero, ĝi ekis novan eraon je la revolucise-rio kaj, kaŭze de siaj ideoj, ĝi estis la antaŭiranto de la granda socia revolucio. La nekredeblaj, malnoblaj kaj kruelaj amasmurdoj, per kiuj la burĝaro festis ĝian fiaskon, la fieca venĝo, kiun la ekzekutistoj prenis sur la malliberuloj dum naŭ jaroj, tiuj hommanĝulaj orgioj, malfermis abismon inter la burĝaro kaj la proletaro, kiu neniam estos replenigata. Dum la sekva revolucio la popolo scios tion, kion ĝi devas fari, scios tion, kio atendas al ĝi, se ĝi ne atingos plenan venkon – kaj ĝi agos konsekvence.

Efektive nun ni scias, ke je la tago, kiam Francio pleniĝos per ribelaj komunoj, la popolo nepre ne redonu al si registaron kaj ne esperu de tiu ĉi registaro la iniciaton de revoluciaj rimedoj. Post forbalai la parazitojn, kiuj rongas ĝin, ĝi alproprigos ĉiun riĉaĵojn por komunigi ilin laŭ la principoj de la anarkista komunismo. Kaj, kiam ĝi estos plene nuliginta la proprieton, la registaron kaj la ŝtaton, ĝi stariĝos libere laŭ la bezonoj, montrataj de la vivo mem. Disrompante siajn ĉenojn kaj faligante siajn idolojn la homaro antaŭeniros tiam al pli bona estonto, malagnoskante mastrojn kaj sklavojn, sen plia respekto ol tiu al la noblaj martiroj, kiuj pagis per sia sango kaj suferoj tiujn ĉi unuajn liberigajn provojn, kiuj lumigas nin en nia marŝo al la konkero de la libero.

### III

La publikaj festadoj kaj kunvenoj okazintaj la 18an de marto en ĉiuj urboj, kie estas stariĝintaj socialistaj grupoj, meritas nian plenan atenton, ne nur kiel manifestacio de la proletarismo, sed pli ankoraŭ kiel esprimo de la sentoj, kiuj inspiras la socialistojn de la du mondoj. Tiel oni “sciigas” pli bone ol per ĉiuj imageblaj gazetoj kaj oni formulas siajn aspirojn je plena libero, sen esti influata de konsideroj pri balota taktiko.

Fakte la proletoj, kunvenintaj tiun ĉi tagon ĉe la mitingoj, jam ne limiĝis laŭdi la heroismon de la pariza proletaro aŭ elvoki venĝon kontraŭ la majaj masakroj. Ili, firmigante la memoron pri la heroa lukto de Parizo, antaŭeniras pluen. Ili debatas la sciigaĵojn, kiujn oni nepre eltiru el la 1871a Komunumo, por la estonta revolucio; ili demandas pri la eraroj de la Komunumo kaj tio ĉi, ne por kritiki la homojn, sed por reliefigi tion, kiel la antaŭjuĝoj pri la propio kaj la aŭtoritato, regantaj je tiu momento, malebligis al la revolucia ideo ekflori,

disvolviĝi kaj lumigi la tutan mondon per siaj vivigaj lumoj.

La instruado de la 1871a profitis la proletaron el la tuta mondo kaj, dispecigante la malnovajn antaŭjuĝojn, la proletoj asertis klare kaj simple, kiel ili konprenas *sian* revolucion.

Ekde nun certas, ke la proksima ribelo de la komunumoj jam ne estos simple *komunumista* movado. Tiuj, kredantaj ke oni starigu la sendependan komunumon kaj poste provi ekonomiajn reformojn ĉe tiu ĉi komunumo, estas preterpasitaj de la disvolvo de la popola spirito. Estas per socialistaj revoluciaj agoj, nuligante la individuan proprieton, kiel la komunumoj de la proksima revolucio starigos kaj firmigos *sian* sendependon.

Je la tago, kiam, kiel sekvo de la disvolvo de la revolucia situacio, la registaroj estos forbalaitaj de la popolo kaj la senorganizado ĵetita al la kampo de la burĝaro, kiu tenas sin nur danke al la protekto de la ŝtato, je tiu tago – kaj ĝi

ne estas for— la ribela popolo ne atendas tion, ke kiu ajn registaro dekretu per ties nekredebla saĝo ekonomiajn reformojn. Ĝi mem neniigos la individuan proprieton pere de la perforta senproprigo kaj ekposedos je la nomo de la tuta popolo ĉiun socian riĉecon, kiu estis amasigita de la laboro de la antaŭantaj generacioj. Ĝi ne limiĝos senproprigi la posedantojn de la socia kapitalo per dekreto, kiu estus mortinta litero, ĝi ekposedos ĝin surmomente kaj starigos siajn rajtojn per ĝia senprokrasta uzado. Ĝi organizos sin mem ĉe la laborejo por funkciigi ĝin; ĝi ŝanĝos sian ĉambraĉon per saniga loĝejo ĉe burĝo; ĝi organizos sin por utiligi tuje ĉiujn riĉaĵojn amasigitajn ĉe la urboj; ĝi ekposedos tiujn riĉaĵojn, kvazaŭ ĝi neniam estus ŝtelitaj al ĝi de la burĝaro. Tuj post senproprigi la industrian baronon, la produktado daŭriĝos senbarigante sin de la bariloj, kiuj malhelpas ĝin, nuligante la spekulaciojn, kiuj mortigas ĝin, kaj la implikaĵojn, kiuj malorganizas ĝin, kaj sin modifante, laŭ la bezonoj de la momento, sub la impulso, kiun donos al ĝi la libera laboro. «Neniam oni kultivos denove kiel je la 1783a, post kiam la tero estis forprenita el la manoj de la sinjoroj», skribis Michelet. Neniam oni laboris kiel laboros je la tago, kiam la laboro estos libera, kiam ĉiu progreso de la laboristo estos fonto de bonfarto por la tuta Komunumo.

Rilate al la socia riĉeco oni klopodis starigi diferencon kaj eĉ la socialista partio ekdispartiĝis kaŭze de tiu diferenco. La skolo, hodiaŭ nomiĝanta *kolektivisma*, anstataŭigante la kolektivismon de la malnova Internacio (kiu estas nenio pli ol kontraŭaŭtoritata komunismo), per ia doktrinema kolektivismo, klopodis diferencigi la kapitalon, kiu servas la produktadon, el la riĉeco, kiu servas la vivbezonojn. La maŝino, la fabriko, la krudaĵo, la komunikiloj kaj la grundo unuflanke, la loĝejoj, la produktaĵoj, la vestoj, la varoj aliflanke. Iuj iĝas kolekti-

va proprieto, la aliaj celas —laŭ la doktaj reprezentantoj de tiu ĉi skolo— resti individua proprieto.

Oni klopodis starigi tiun ĉi diferencon. Sed la popola bona senco nuligis ĝin rapide. Erara laŭteorie, ĝi fiaskis antaŭ la vivpraktiko. La laboristoj komprenis, ke la domo, kiu ŝirmas nin, la karbo kaj la gaso, kiujn ni bruligas, la nutraĵoj, kiujn bruligas la homa maŝino por elteni la vivon, la vestoj, per kiu la homo sin kovras por protekti sian eston, la libro, kiun li legas por instruiĝi, eĉ la ornamo, kiun li akiras, estas integriga parto de ilia ekzistado, tiel bezonaj al la sukceso de la produktado kaj al la progresema disvolvo de la homaro kiel la maŝinoj, la manufakturaĵoj, la krudaĵoj kaj la ceteraj agentoj de la produktado. Ili komprenis, ke elteni la individuan proprieton sur tiuj ĉi riĉaĵoj estus elteni la malegalecon, la subpremadon, la ekspluatadon, paralizi dekomence la rezultojn de la parta senproprigo. Surpasante la pikdratojn, kiujn starigis sur ilia vojo la kolektivismo de la teoriuloj, ili marŝas rekte al la plej simpla kaj praktika formo de la kontraŭaŭtoritata komunismo.

Efektive ĉe siaj kunvenoj la revoluciaj proletoj firmigas klare sian rajton sur ĉia socia riĉaĵo kaj la bezonon neniigi la individuan proprieton tiel sur la konsumrimedoj kiel sur tiuj porproduktaj. «Je la tago de la revolucio ni alpropigos la *tutan* riĉecon, *ĉiujn* valoraĵojn, kiuj estas amasigitaj ĉe la urboj, kaj faros ilin komunaj» asertas la proparolantoj de la laborista amaso kaj la aŭskultantoj subtenas tion per unuvoĉa konsento.

«Kiu ajn prenu el la amaso tion, kion li bezonas, kaj ni certas, ke en la grenejoj de niaj urboj estas sufiĉaj nutraĵoj por nutri ĉiujn ĝis tiam, kiam la libera produktado ekos sian novan marŝon. En la magazenoj de niaj urboj estas sufiĉaj vestoj por vesti ĉiujn, tie amasigitaj sen trovi merkataliron apud la ĝenerala mi-zero. Estas eĉ sufiĉaj luksaĵoj por ke ĉiu

povas elekti laŭplezure.»

Jen kiel –laŭ tio, kion oni diras en la kunvenoj– la proleta amaso alfrontas la revolucion: tuja enkonduko de la anarkiista komunismo kaj libera organizo de la laboro. Tiuj ĉi estas du fiksitaj punktoj kaj tiurilate la komunumoj de la revolucio, kiu blekas apud niaj pordoj, ne ripetos la erarojn de siaj antaŭantoj, kiuj per sindonema elverŝado de sia sango senbariligis la vojon al la estonto.

Similan konsenton ankoraŭ ne stariĝis –kvankam estas proksima ĝia stariĝo– pri alia ne malpli grava punkto: pri la afero de la *registaro*.

Sciate, rilate al tiu ĉi afero alfrontas reciproke du skoloj. «Nepras» –diras iuj– «starigi je la tago de la revolucio mem registaron, kiu akiru la povon. Tiu ĉi registaro –fortika, povoplena, senhezita– *faros* la revolucion dekretante tie kaj tie ĉi kaj devigante obei siajn dekretojn.»

«Kompatinda iluzio» –diras aliaj– «Ĉiu centra registaro, kiu okupiĝas regi nacion, kiun integrigas nepre malsimilaj eroj kaj kiu estas konservema kaŭze de sia registara esenco, estos nenio pli ol barilo al la revolucio. Ĝi faros nenion pli ol bremsi la revolucion ĉe la komunumoj pretaj antaŭeniri, sen taŭgi alporti revolucion inspiron al la prokrastitaj komunumoj. Same okazos ene de ribelema komunumo. Ĉu la registaro faros nenion pli ol aprobi la plenumitajn agojn, kaj tiam ĝi estos senutila kaj danĝera ero, aŭ ĝi deziras ĉefi ĝin: ĝi reguligos tion, kio, por sukcesi, devas esti libere prilaborota de la popolo mem, ĝi aplikos teoriojn, kie nepras, ke la plena socio kreos novajn formojn de komunema vivo per tiu ĉi kreanta forto, kiu aperas ĉe la socia organismo, kiam ĝi tranĉas la ĉenojn kaj vidas tion, kiel malfermiĝas por si novaj kaj ampleksaj horizontoj. La homoj ĉe la povo generos tiun ĉi impulson, sen produkti nenion ili mem, se ili restas ene de

la popolo por prilabori kune kun tiu ĉi la novan organizadon anstataŭ sin fermi ĉe la ministrejo kaj elĉerpiĝi per senutilaj debatoj. Ĝi estos barilo kaj danĝero, senpova por la bono, mirinda por la malbono, sekve ĝi havas nenian kialon esti.»

Kvankam tiu ĉi rezonado estas plej natura kaj ĝusta, ĝi alfrontas ankoraŭ la amasigitajn jarcentaĝajn antaŭjuĝojn, kiujn rajtigas tiuj, dezirantaj elteni la religion pri la registaro apud la religio pri la proprieto kaj la religio pri dio.

Tiu ĉi antaŭjuĝo –la lasta el la serio: Dio, Proprieto, Registaro– ekzistas ankoraŭ kaj estas danĝera al la proksima revolucio. Sed oni povas vidi, ke jam estas subfosita. «Ni mem faros niajn aferojn sen atendi ordonojn de iu ajn registaro kaj renversos tiujn, kiuj klopodis trudiĝi al ni, ĉu sub formo de pastro, de proprieto aŭ de registarulo», diras jam la proletoj. Oni rajtas esperi do, ke, se la anarkiista partio daŭre kaj fortike kontraŭbatalas la religion pri la registaremo kaj se ĝi mem ne devojiĝas lasante sin impliki je la luktoj por la povo, oni rajtas esperi, ni diras, ke je la venontaj jaroj, mankantaj ankoraŭ ĝis la revolucio, la registarema antaŭjuĝo estos sufiĉe subfosita, por ke ĝi ne kapablu vojerarigi la proletajn amasojn.

Estas tamen bedaŭrinda mankaĵo ĉe la popolaj kunvenoj, kiun ni devas rimarki. Tiu ĉi estas, ke nenion aŭ preskaŭ nenion oni faris por la kamparo. Ĉio rondiras la urbojn. La kamparo ŝajne ne ekzistas por la urbaj laboristoj. Eĉ la prelegantoj, kiuj parolas pri la karaktero de la proksima revolucio, evitas nomi la kampon kaj la grundon. Ili konas nek la kamparon nek ties dezirojn kaj ili ne kuraĝas paroli je ties nomo. Ĉu nepras insisti pri la danĝero, kiu sekvas el tio? La proleta liberigo ne eblas, se la revolucia movado ne enhavas la vilaĝojn. La ribelaj komunumoj atingos sin elteni eĉ ne dum unu jaro, se la ribelo ne disvastiĝas samtempe ĉe la kamparo. Kiam la impostoj, la

hipoteko, la rento estos nuligitaj, kiam la institucioj, rikoltantaj ilin, estos nuligitaj, certe la kamparo komprenos la avantaĝojn de tiu ĉi revolucio. Sed ĉiaokaze estus malprudente kalkuli pri la disvastiĝo de la revoluciaj ideoj tra la kamparo sen la antaŭpretigo de la ideoj. Nepras scii jam ekde nun, kion deziras la kamparano, kiel oni komprenas la revolucion ĉe la vilaĝoj, kiel oni kalkulas solvi la tiom malfacilan demandon pri la agra proprieto. Nepras diri anticipe al la kamparano, kion la proleto pensas fari kun la kamparo kaj kun sia aliancano, ke tiu ĉi ne bezonas timi el tiu rimedojn, kiuj damaĝos la kultiviston. Nepras, ke la urba laboristo kutimiĝu respekti la kamparano kaj marŝi konsente kun li.

Sed por tio la laboristoj *devigiĝu disvastigi la propagandon en la vilaĝoj*. Gravas, ke en ĉiu urbo estu eta aparta organizo, branĉo de la Agra Ligo, por propagandi inter la kamparanoj. Nepras, ke tiu ĉi speco de propagando estu pritaksita kiel devigo, samgrade kiel la propagando ĉe la industriaj centroj.

La komencoj estos malfacilaj, sed ni memoru, ke el tio dependas la sukceson de la revolucio. Tiu ĉi ne estos sukcesa, ĝis kiam la fabrika laboristo kaj la kampa kultivisto marŝos manenmane al la konkero de la egaleco por ĉiuj, alportante la feliĉon tiel al la kabano kiel al la konstruaĵoj de la grandaj industriaj amasigoj.

i Ni prenis tiujn ĉi liniojn el la *Historio Popola kaj Parlamenta de la Pariza Komunumo*, verkita de ARTHUR ARNOULD, verko, pri kiu ni kun plezuro altiras la atenton de la legantoj.

ii Verkita je marto de la 1881a

---

---

KROPOTKIN, Piotr: «La Commune de Paris», *Le Révolté* (1880). Esperantigita de Jurgo Alkasaro el *La Brochure Mensuelle* 180(1937)14-32.

Marton de la 2010a

---

---



